LSG FORUMO n–ro 136 (1-2 / 2007)

Membrogazeto de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

# JAPANIO gastigos vin dum la Univerala Kongreso 2007



## ENHAVO

Presindikoj, Komenca saluto p. 2

**Fokuso**

Akriĝa evoluo por gejoj en Pollando p. 3

Letero de LSG-estraro al UEA p. 4

Frankfurta CSD invitas polojn p. 4

**Beletra Niĉo**

Ihara Saikaku: Ili mortis tiel kiel falas ĉerizaj floroj p. 4

Hasnain Kazim: La tragika rakonto pri la geja hinda princo p. 9

**Temoj**

aidoso, kondomoj, maljunuloj p. 10

nuptoj, policoj, CSD *(i.a. Tokio)* p. 11

# L. S. G.

**Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj**

interretejo: http://lsg-esperanto.org
adreso: la sekretario (vidu sube)
membriĝo: ĉe la sekretario
kotizoj: 10 EUR por 1 jaro
25 EUR por 3 jaroj

**Estraro**

prezidanto: [arvimide@earthlink.net]
Arnold VICTOR, Usono
Apartment 1, 160 West Eleventh Street
New York City, New York 10011, USA

sekretario lasekretario@gmx.net]
kaj kasisto: [lakasisto@gmx.net]
Rolf KÖHLER, Germanio

varbado: [fsoghomonian@yahoo.fr]
Francis, Francio

estraranoj: [kvakke@hotmail.com]
Torstein, Norvegio

retejo: [randy.dean@pobox.com]
Randy, Usono

## FORUMO 136

**Membrogazeto de la LSG (1-2 / 2007)**

adreso: la sekretario (vidu supre)
redakcio: [laredaktanto@gmx.net]
Bernvardo, Germanio, k.a.

interreta versio: La gazeto aperas ankaŭ interrete kiel PDF-dosiero (vidu interretejo) Por via integro ĉiuj eventualaj familiaj nomoj kaj adresoj estas forigataj en la interreta versio.

ekspedo la sekretario (vidu supre)

*Nepre **ne** kontaktu la personon sur la etikedo de la koverto! La persono **ne** estas ligano. Ni nur pro la favoraj poŝttarifoj forsendas la gazeton el Ĉeĥio*

# Komenca saluto

Ĉar bedaŭrinde la provizora redaktanto Andreas Nordström nun definitve devis rezigni sian laboron, restas al mi la kara tasko danki lin pro lia bona laboro, kies amplekso mi nun ĵus povis sperti.

Mi estis akceptita kiel nova redaktanto de la LSG-estraro kaj mi dankas ilin por la senrezervaj fidoj en miaj kapabloj. Mi jam delonge estas membro de LSG, kun la numero 334, kaj kelkaj el vi certe konas min el pli fruaj tempoj. Ke mi ne publikigas mian ĝustan nomon, havas siajn kaŭzojn, kiuj ne nepras ĉi tie diskutiĝi, sed se vi sendas kontribuojn per la donita epoŝta adreso, ili senpere min atingas, dum la paperan poŝton mi ricevu de la sekretario.

Certe vi rimarkas, ke mankas bildoj kaj fotoj, ĉar mi ankoraŭ ne estas sperta en trovi tiajn sen kopirajto. Eble vi povas helpi min tiurilate, sed sciu, ke ne eblas publikigi nedecajn bildojn pro diversaj cirkonstancoj de la ricevantoj.

Lasu mi nun saluti vin ĉiujn je bona onto.

*Bernvardo*

**Kontribuoj por FORUMO kiel informoj, bildoj kaj artikoloj estas ĉiam bonvenaj**

*Vi bonvolu kompreni …*
*… ke nur libere uzeblaj kontribuoj povas esti akceptataj*
*… ke estas neniu garantio, ke alsenditaj kontribuoj estos publikigataj*
*… kaj ke materialo nur en esceptaj kazoj povas esti resendata al vi.*

*Ni konservas al ni la rajton redakcie ŝanĝi kontribuojn.*

*Nesignitaj artikoloj estas de la redakcio.*

**Kontraŭgeja Leĝo en Pollando**

Meze de marto 2007 la Pollanda ministro por klerigado, Roman Giertych, ĉefo de la ultrakonservativa partio Ligo de Polaj Familioj, skizis leĝproponon, kiu malpermesu ĉiun specon de "homoseksuala propagando", cele al la protekto de la junularo.

Instruistoj laŭ tiu propono estus punataj, se ili temigas iel ajn samseksemjajn partnerecojn, je okaza maldungo eĉ. Ankaŭ klerigaj materialoj rilate al HIV aŭ aidoso aŭ tiurilataj preventaj strategioj estu strikte malpermesataj.

Giertych pravigas sian proponon per la ordono de la konstitucio meti la familion sub specialan protekton. Lia anstataŭanto eĉ kredas eksciinti, ke grupoj de gejoj provas celstrebe rekrutigi lernantojn al geja orientiĝo, ekz. kiam ili disdonis broŝurojn kontraŭ-aidosajn, en kiu troviĝas bildoj de du sin kisantaj viroj. Ĉu la proponita leĝo estus konforma al la antidiskriminaciaj leĝoj de la EU, estas sufiĉe dubinda.


**parada rownosci**

Fortaj protestoj jam aŭdiĝis de la civilrajta movado, el kies reprezentantoj s-ro Tomasz Baczkowski asertas, ke la leĝopropono estas fakte samvorta kopio de la naziaj Nurembergaj leĝoj pri rasoj, se oni substituas la vorton "judo" per "samseksemulo". En Varsovio pluraj miloj de instruistoj demonstraciis i.a. kontraŭ tiu leĝo.

Giertych kaŭzis ankaŭ sur plej alta nivelo politka grandan indignon. Dum la neformala renkontiĝo de la konsila EU-ministraro por la tuta Eŭropo, ĉar jam 11-jaraj infanoj en la nuna situacio pro la geja propagando kutimiĝus al samseksemo, kontraŭe al kio li pledus por la subteno de 'sanaj familioj'. Li pro tio rikoltis akran kontraŭrespondon.

Ke Giertych staras sola en la registaro pola, oni tute ne povas supozi. La pola prezidanto mem, Lech Kaczynski, kiu en 2005 ankoraŭ kiel urbestro de la pola ĉefurbo Varsovio malpermesis la 'parada rownosci'-on (parado por samrajtigo, kiu tamen okazis kun ĉirkaŭ 2500 partoprenantoj), jam lastan jaron deklaris okaze de vizito en Londono dum BBC-intervjuo, ke la disvastiĝo de tiel nomata geja kulturo rezultigos en formortado de la heteroseksuala kulturo. Kaj en februaro de tiu ĉi jaro dum vizito en Dublino en Irlando li denove asertis, ke la homa raso malaperos, se oni permesus liberan subtenon de samseksemo.

De multaj flankoj nun kreskas la premo sur Angela Merkel, la germana kancelerino, kiu dum la unua duonjaro 2007 oficas kiel prezidantino de la Eŭropa Unio, klare ekspliki al Kaczynski la bazajn leĝe fiksitajn ideojn de la EU pri samrajtigo kaj antidiskriminacio de ĝiaj minoritatoj kaj postuli de la pola ŝtato konformajn agojn.

En aprilo 2007 la parlamento en Pollando decidos pri la akcepto de la leĝpropono de Giertych.

Pro la malagrabla dinamiko en Pollando LSG-prezidanto Arnold Victor decidis reagi per letero al la UEA-pinto, kiu estas dokumentata en la sekvo.

Krome vi povas informiĝi pri iniciato por tre konkreta helpo fare de la CSD-komitato en la germana urbo Frankfurt am Main.

## Letero de LSG-estraro al UEA

Tiu ĉi letero estas sendota kaj al la UEA-prezidanto Renato Corsetti kaj al la konstanta kongresa sekretario Clay Magalhaes por esprimi la zorgon de LSG pri la proideologie katenaj streboj en Pollando.:

Estimata,

Kun profunda bedaŭro ni estraranoj de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj rimarkis la maladmirindan sorton de gegejoj en Pollando. Instancoj, kiel Ligo de Polaj Familioj, kiu esperantlingve favoris al la ĉefa ĉesiganto de Radio Polonia en Esperanto Targalski, intervenis favore al diskriminacio kontraŭ gegejaj instruistoj. Se oni planas UK-on en Pollando, cŭ estas garantio ke ni, plenrajta faka organizo, plenrajte povos partopreni tian UK-on? Se ne, ni forte rekomendos kontraŭ partopreno aŭ submetiĝo al humiligaj leĝoj.

Laŭ evoluontaj kondiĉoj ni ne hezitus al gejaj Geesperantistoj kaj aliaj defendantaj de civilrajtoj averti kontraŭ vizitado, renkontiĝo, aŭ eĉ kongreso en Pollando. Kun plena respekto al niaj samideanoj de ebla LKK en Pollando, ni petas, ke ili kun vi konsciu pri niaj zorgoj.

*Arnold Victor, prezidanto de L. S. G.*

## Frankfurta CSD invitas polojn

Pro la ĉiam pli restriktaj cirkonstancoj en Pollando, la organiza teamo de la Christopher Street Day (CSD) en Frankfurt am Main en Germanio jam en la lasta jaro komencis kun la iniciato Regenbogen-Polen (ĉielarka Pollando) inviti polajn gegejojn el diversaj urboj por la tiea CSD-semajnfino je la 20a – 22a julio 2007.

La poloj nur devas pagi la veturkostojn (por ili tamen sufiĉe altajn), sed la gastigantoj en la urbo transprenos la tranoktojn kaj manĝojn. Ili povas uzi la helpon de tradukistoj, partopreni en diversaj aranĝoj (ekzemple ĉiĉeronadon tra la urbo) kaj havas je dispono propran malferman kamionon ŝoforotan en la parado.




La senco de tiu agado estas, ke la gegejoj, kiuj en siaj hejmaj lokoj kaŝe vivas sub granda publika premo, povu dum tri tagoj sperti la kompare liberan etoson kaj senkaŝan subscenan vivon en la urbo kaj tiel fortikigu siajn memestimojn.

Kontaktebloj en la germana kaj pola vi trovas sub "www.csd-frankfurt.de".

# B E L E T R A N I Ĉ O

**Ihara Saikaku** estas japana verkisto i.a. de amrakontoj, kiu en Japanio estas fama tiom kiom ekz. Boccaccio aŭ Casanova en Eŭropo. Li naskiĝis en Osako en la jaro 1642 p.K. kaj mortis 1693 p.K. Li perdis frue la gepatrojn kaj 1675 p.K. la edzinon. Ŝajne li povis vivteni sin de propra havaĵo kaj de la enspezoj el siaj libroj, kies nombro estas eble du dozenoj, kaj el aliaj verkaĵoj.

Dekomence li estis alta majstro de la poema formo hajko, laŭfame en la nokto de la morto de sia edzino li teksis kvarmil da ili. Lia proza stilo ŝanĝiĝis de fantasmaj rakontoj pri la plezurkvartala vivo al ĉiam pli ĝeneralaj kaj realismaj priskriboj ankaŭ de la malgajaj aspektoj de la vivo, en kiu li, ofte sub ironia masko, submetas la personojn kaj eventojn al severa Konfucee morala juĝo.

Por pli bona kompreno de la sekva rakonto oni sciu, ke en tiu tempo por la batalistoj nomataj "samurajoj" la amo inter viroj signifis la plej alta kaj honora formo, kaj rilatoj inter ili obeis tre komplikajn regulojn pri honoro kaj reciproka dediĉo, kiu ankaŭ ne haltis antaŭ la propra morto por la amato.

# KOMUNE ILI MORTIS TIEL KIEL FALAS ĈERIZAJ FLOROJ

Amrakonto pri junaj samurajoj de la japano Ihara Saikaku ( 1642 – 1693 p.K. )

Por favori sian belecon, ĉiu ajn ĉeriza floro ruinigas la braĉon, sur kiu ĝi sin disvolvigas.

Iam jen estis ulo kun la nomo Itama Ukijo, kiu servis en la dungo de certa princa grandaĉamberleno. Junulo, en ĉiuj aferoj klere edukita kaj de tia beleco, ke ĉiu estis blindigata pro lia fiziko.

Nu en la sama domo vivis ankaŭ Mokava Uneme, dekokjara, rektanima kaj tute konforma al sia erao junulo. Kiam tiu je tempo ekvidis la brilan staturon de Ukijo, li estis tiom sorĉumata de tiu aspekto, ke konfuziĝis lia koro kaj liaj sensoj senfortiĝis; ja preskaŭ ne plu li povis teni sin sur siaj ŝancelaj kruroj.

En tia stato li sin ĵetis sur sian kuŝejon, ŝlosis la riglon de la pordo, kaj dum tagoj kaj noktoj samforte li lamentis super ĉia mezuro. Kaj tio, kiel li tiamaniere pli kaj pli senfortiĝis, malgajigis liajn plej intimajn amikojn; per kuraciloj kaj ja kelkaj alioj ili zorge vartis lin.

Foje sin kunigis aro da junaj homoj por viziti la malsanulon; inter ili troviĝis ankaŭ tiu, al kiu li elame soifegis. Unema ja kaŝis siajn emociojn, tamen eble ili ŝance, pro lia konfuzemo, difuzis el lia vizaĝo kaj liaj vortoj; la vizitantoj ĉiukaze kapablis supozi, kio korpremis lin.

Unu el ili estis Ŝiga Samanosuke, kiun delonge ligis la ĵuro de la amovojo al Unemo, kaj ĉar la Unema konduto ŝajnis al li suspektinda, li, post kiam la aliaj estis foririntaj, postrestis sola, sin suben klinis al la suferanta kuŝanto kaj flustris al tiu: "Estas vere malracia, la maniero de via aktorado. Se vian koron io pezigas, kial ne konfesi ĉion al mi. Certe vi sur iun el tiuj, kiuj ĵus vizitis vin, direktis vian deziregon. Sed ke muta vi enpensiĝadas en tio, jen figrava peko via!" "Ne, ne, tiel nefaktas", Uneme respondis dusence, per kio la afero por li estis finita. Kiom ajn Samanosuke demandojn al li urĝis, li respondis al li eĉ ne unu vorton pli, kaj jen kuŝis kvazaŭ duone falinta en dormon.

Nun oni venigis Jin-Jang-majstron, kiu inspektis Uneme'n kaj post tio deklaris: "Pro tiu malsano li ne mortos. Lin sieĝas fantomo, eble eĉ spirito de vivanto. Plej bone vi petu kelkajn adorindajn sanktulojn, ke ili apliku al li ekzorcan ritualon."

Do oni mendis la patriarkon Tenkaj el Ueno kaj la mezrangan vicepiskopon el Asakusa, kaj tiuj du ekflamigis la Budaofajron kaj preĝis tri tagojn kaj du noktojn sen ĉeso; krome la patrino de la malsanulo direktis al ĉiuj grandaj Ŝinto-altaroj en sia hejma provinco petegajn ĵurpromesojn. Kaj vere, kvazaŭ tio helpus, la malsano malgraviĝis iomete.

Tiam denove Samanosuke ŝteliris al li kaj diris: "Mi scias, Uneme, ke vi zorgemas pri via bonrilato al mi; tial vi retenas de mi vian kordeziron, ĉu ne? Spite mi arde ŝatus esti via peranto kaj havigi al vi respondan amleteron de la de vi adorato. Estu nur tute sen timozorgo kaj translasu ĉion al mi."

"Ho, kiom feliĉa mi estas, ke tiel vi parolas al mi, pro malnova amikeco", respondis Uneme, verkis leteron plene verŝanta sian korsangon kaj transdonis ĝin al Samanosuke.

La leteron en sia maniko Samanosuke iris kvazaŭ hazarde en la ĉambron de horloĝoj, kiam sin akompanigis Ukijo, kiu ĝis ĵus estis admirinta la ĉerizajn florojn kaj nun komencis plendi: "Hieraŭ mi pasigis la

tutan tagon tiel, ke mi laŭtlegis por mia majstro el la "Politikaj gvidideoj el la erao Zenguan"; hodiaŭ mi devis reciti poemojn el la "Ŝinkokinŝu"; tial mi opiniis je mi, kelka ripozo necesas al vi, kaj mi dialogis iomete kun la silentantaj ĉerizofloroj."

Je tio Samanosuke menciis al li: "Kia bonsorta kunokazo! Jen io, kio ankaŭ petas silente vian indulgon." Kaj ŝovis li faskon de paperoj profunden en la manikon de Ukijo.

"Ĉu vi ne miselektis pordon?", ridante elvokis Ukijo, poste tamen iris al loko ombra sub la arboj en la ĝardeno, kie li, videble, tuj komencis legi tiun leteron. Post daŭro li revenis kaj diris: "Se li tiom pro mi suferas, mi ne povas observi ĉion nefara."

Ja je la plej sama tago Ukijo sendis sian respondon, kaj apenaŭ oni transportis ĝin al Uneme, jam tiu elpaŝis sian dormoĉambron kaj ĝis la vespero estis regajninta komplete sian iaman sanon.

En la mondo tamen ne ĉio iras laŭvole. La grandaĉamberleno nu antaŭ tempeto al si dungis samurajon, kiu nomiĝis Hosomo Ŝuzen, kaj kiel fiera batalisto klikigis sian glavotenilon de mateno ĝis vespero, pro kio lin evitis ĉiu ajn.

Tiu homo ankaŭ enamiĝis al Ukijo; tamen li ne kapablis bridi sian sovaĝan karakteron, li ankaŭ ne servigis peranton, sed subite ĵetis sin el sub la florantaj arboj, kaj hurlis kaj ridis, ke sonoregis en la oreloj kiel la stridado de la cikadoj.

Malatentade tiajn kaj similajn provojn enflati sin, Ukijo al li respondis eĉ ne unu vorton, sekve de kio Ŝuzen profundiĝis en la plej senkonsolan melankolion.

Sed eĉ Ŝuzen almenaŭ havis – sam' al samo kuniĝemas – iun amikon en la domo, nome la pastron Fuŝiki Ŝosai, kies tasko estis prizorgi la Ĉado-teilojn. Tiu prenis sur sin la taskon varbi por la aminklino de Ŝuzen, kaj diris al Ukijo: "Mi forvetis mian vivon je tio, ke vi sendos al li amoriĉan respondon."

Ridante Ukijo respondis: "Dekorus vin pli bone, eminenco, senpolvigi la teilaron per la plumbrosilo. Tia kuplaĉo estas ekster via taskaro. Eble vi povas utiligi tiun ĉi leteron kiel ŝtopilon por via tekruĉo." Per tio li reĵetis al tiu la amproponon de la samurajo.

Nun Ŝozaj ne plu sciis alian elsolvon. Li agresigis Ŝuzen kontraŭ Ukijo, kaj ili du konsentis mortbati tiun kaj en la sama nokto fuĝi en alian provincon.

La momenton, en kiu Ukijo aŭdis pri tio, ke tiuj du finpretigis siajn preparojn kaj nur atendis la vesperan krepuskon, li decidis mem eki tion, kio post ĉio estis neevitebla. "Se mi nenion diras al Uneme pri tiu batalo, lia kolero estos des pli granda. Se mi parolos pri ĝi al li, tio aspektus kvazaŭ mi petas lian glavan helpon, kaj tio do ne harmonias kun la batalista kuraĝo", li kun trankvila koro meditis. "Ne, mi ne enmiksigu lin", li decidis kaj ne informis Uneme'n.

Estis en la nokto de la deksepa tago en la monato de la leporo, kaj oni notis la deksepan jaron de la erao Kan'ei. Ĵus en tiu nokto falis fortega pluvo, kaj eĉ la noktaj gardistoj uzis, konkerita de la dormemo, siajn manikojn kiel kusenojn kaj estis falintaj en kvazaŭ senkonscian dormon.

"Nun estas la tempo", pensis Ukijo kaj sin levis. Li estis vestinta sin tiom belege, ke ne estas ebla priskribi. Kun la ĉe la kolumo dense fermata fragila silkvesto, kies blanko hontigus la neĝon, li portis Hakamapantalonon de brokato altenigita je la orloj, kaj pli abunde ol kutime li traaromigis siajn vestojn per incenso. Uzprete preminta al si la longaglavon, li per silentaj paŝoj ekiris. La ununuro, kiun li ne povis kaŝi, estis la incensa aromo, kaj fakte eldormiĝis du

gardostarantoj pro tiu surprizataj, sed lasis lin tamen preterpasi sen alvoki lin.

Lia kontraŭulo Ŝuzen devis servi en la granda halo. Tie li apogis sin kontraŭ ĉambroekrano tute pentrita je falkoj kaj rigardis kun klinita kapo sian faldventumilon, el kiu malfiksiĝis stifto, kiam Ukijo alsturmis kaj kun laŭta krio hakis sur lin tiel, ke la bato penetris de la dekstra ŝultropinto ĝis profunden en la brusto.

Nu sendube ankaŭ Ŝuzen estis brava viro, per la maldekstra li eltiregis sian glavon kaj dum daŭro li barumis la sekvajn batojn. Fine tamen li vokis sub turmentoj de mortanto: "Ho, malbenite!", kaj frakasite falis. Ankoraŭ du fojojn Ukijo boris la klingon en la korpon, regalis post tio ankaŭ tiun tepastron per bato kaj blovestingis la lumilojn.

Intertempe pro la tintado de la armiloj la aliaj en la domo ekvekegis el la dormo. La noktaj gardistoj rapidis taĉmente tra la koridoroj, la samurajoj el la najbaraj ĉambroj alkuregis; simile al tio oni imagus la tumulton, kiu kvincent jarojn antaŭe eksplodis post la fama mortigo pro revenĝo en la ĉaskampoj apud la monto Fuĉi. Oda kaj Tabeke Ŝiro, kiuj servadis ĉe la enirejaj ŝtupoj, ekflamigis tuj la lumilojn, ĉirkaŭis Ukijo'n kaj gvidis lin antaŭ la grandaĉamberlenon.

Tiu kriis per laŭta voĉo: "Eĉ se vi agis el prava ajn kaŭzo, vi vundis vian devon je obeo al via superulo, kaj tio estas nepardonebla."

Paralele li ordonis al sia kortuma mastro de l' domaro Tokumatsu okazigi ekzamenon pri la konkretaj cirkonstancoj; post kiam tamen estis raportata la okazaĵaro al li, li decidis, ke oni indulgu Ukijo'n. Tiel Ukijo estis translokigata en apartan ĉambron kaj dum la nuna nokto traktata kun ĉia respekto.

La patro de la mortbatito estis Hosono Mimbu, kiu delonge servis al la dinastio Ogasavara; kiam li nun aperis ĉe la loko, ĉe kiu lia filo estis mortigita, li postulis kolere: "Estas deca, ke oni juĝu la farinton al memmortigo per Sepuku."

La patrino siaflanke, praiam dorlotita de la klana princino kaj invitata al ĉiu poemsocieto, pasigis la nokton per nudpiede vagadi kaj prilamenti la morton de sia filo: "Kiom potenca", ŝi diris, "devas esti iu en tiu ĉi mondo, ke li tiun, kiu mortigis homon, senkaŭze indulgas!" Dum tio ŝi verŝis pli larmojn ol povis sorbi siaj manikoj, kaj ĉiuj homoj kompatis ŝin.

Nu ŝi havis eskortan damon, la filinon de la estro de la palaca intendejo, kiu komence estis discipliniga majstro en la templo Tofukuĉi, poste tamen reiris en la laikan staton. Tiu, certa Goto, sentigis la vipilon al sia ĉevalo kaj rajdis al la granda ĉamberleno por raporti al li, kion lamentis la patrino de la mortulo. Kaj ĉar ŝiaj vortoj estis de konvinka racio, oni transdonis al Ukijo la ordonon fari Sepuku'n. Ŝosaj, kiu estis la peranto, memvole sin mortigis.

Uneme unu tagon antaŭ tiuj ĉi okazaĵoj estis petinta forpermeson por viziti sian patrinon en Kanagava. Tie lin atingis urĝeca mesaĝo de Samanosuke, kiu raportis al li la tutan historion. "Kaj hodiaŭ je tagiĝo Ukijo plenumos Sepuku'n en la templo Keijoĉi en Asakusa."

"Havu dankon por la rapida informo", Uneme respondigis al li, kaj sen adiaŭi sian patrionon li luis rapidan boaton, per kiu li atingis la templon ĵus, kiam la ĉielo komencis heliĝi. En la supertegmentita transirejo, kiu sekvis post la ĉefa pordego, li restis staranta kaj atendadis la eventojn aperontajn.

Temploknaboj kaj pastroj grupiĝis kaj multojn ajn klaĉis. "Tuj aperos ĉi tie rave gracia junulo kaj disfendos sian ventron. Vere, jam la morto de malpli okulfrapa, ja tutkutima infano kaŭzas profundan aflikton

al la gepatroj, des kiom pli la memmortigo de tia senmanke bela filo. Ho, kiom lia patro kaj lia patrino priplorontus lin! Estas kompatige !"

Kiam li aŭdis ilin paroli tiel, Uneme ne povis ne plori. Kaj ĉar ĉiam pli spektontoj, kiuj estis eksciintaj pri la historio, aliradis, li kaŝis sin forete kaj atendis la aperon de Uneme.

Fine estis, akompanata de multnombraj gardistoj, alportata tutnova palankeno kaj demetata ĉe la ekstera pordego. Ukijo, kiu kvietanime grimpis el ĝi, estis vestita plej brile. Kun subvesto de purblanka ĉina damasto brodita per delikataj floroj kaj folioj de la dolĉaligno, li portis la en striktaj faldoj ordigitan ceremonian kostumon el tuniko kaj Hakamapantalono. Kun trankvila kaj serena mieno li ĉirkaŭrigardis; sur la proksimaj tomboj staris densedense la nom'bretoj, por ĉiu familio unu objekto de funebro.

Maldekstre interne de la templa distrikto ĉe la branĉoj de sovaĝa ĉerizarbo videblis ankoraŭ kelkaj noteble tromalfruaj floroj. Ukijo ilin admiris kaj recitis:

> Ho, restus vi eĉ
> ĉe la branĉoj, vi floroj,
> esperante la printempon, trans la jar' –
> vidus vi nur, ke ne
> fideblis en homa kor'.

Kaj ŝajnis, ke dum tio li plene de bedaŭro pensis pri Uneme.

Tiam Ukijo eksidis sur la je la randoj kun brokato brodita mato, alvokis sian sekundanton Kiĉikava Kageiju, kaj post kiam li tranĉis de si la kapan hararon kaj envolvis la striojn en folio de mola papero, li al tiu donis la faskon kaj parolis: "Sendu tion al mia patrino en la kvartalo Horikava en Kijoto kaj skribu akompane, ke tio estas por memori mian lastan horon."

Kiam nun la pastro alpaŝis lin, reŝovis la manikojn de sia viola kostumo, kaj komencis prediki pri la forpaseco de ĉiuj estaĵoj, Ukijo rimarkis: "Nu jes, ankaŭ la belulo, kondiĉe ke li atingas altan aĝon en tiu ĉi mondo, iam ekhavos makule blankan hararon. Sed atingi nun, en la plenfloro de juneco, la celon kaj mem doni al si la finon, tio envere signifas estiĝi Budao."

Kaj kun tio li tiris malvastan, verde koloritan paperon el la maniko, zorge frotis ĝin glaten, postulis penikon kaj tuĉon, kaj verkis tiun ĉi adiaŭan poemon:

> Mi ŝercadis
> sub ĉerizfloroj en printempo,
> sub plena luno en aŭtuno –
> ho, kion mi admiris,
> sonĝo nur estis en sonĝo.

La postan momenton li disfendis sian korpon. Kageiju, laŭ sia devo, forhakis lian kapon kaj jam estis forkuranta, kiam Uneme kun "Mi petas vin!" alrapidis kaj same puŝis la klingon en sian ventron, kaj tiel ankaŭ lia kapo falis teren per la glavo de Kageiju.

Ili havis dekses kaj dekok jarojn kaj ambaŭ estingiĝis sen rezistemo je la fino de longa Kan'ei-printempo. Kiam iliaj servistoj, kiuj longajn jarojn estis kun ili, atingis la lokon de funebro, ili trovis la mortulojn kuŝantajn flank-al-flanke. Kelkaj el ili, famas, lasis senharigi siajn kapojn kaj turnis al la mondo siajn dorsojn, por preĝi por la eterna feliĉo de siaj mastroj.

Ĝis la hodiaŭa tago la tombo de tiuj du troviĝas en la templo Keijoĉi en Asakusa, en la ŝtonon oni ĉizis la adiaŭan poemon de Ukijo, kaj granda estas ilia gloro en la urbo Edo. Ŝiga Samanosuke la sepan tagon poste iris en la morton; en lia lasta letero li konfesis: "Mi ne povas plu vivi en tiu disfuĝema mondo".


Tiel dum mallonga daŭro stakiĝis multa aflikto.

# HINDIO: La tragika rakonto pri la geja Hinda princo

de Hasnain Kazim

Dum sia tuta vivo kaŝis Manvendra Singh Gohil sian seksan orientiĝon. Kiam la filo de maharaĝo malkaŝis sin geja, lia familio senheredigis lin. Nun Gohil batalas por socia sanĝiĝo - en lando, kie samsesemo estas punebla.

Manvendra Singh Gohil faris dum sia tuta vivo ĉion por sekretigi, ke li amas virojn. Liaj gepatroj sciis nenion pri tio, la publiko eĉ tute ne. Gohil estas la filo de la maharaĝo kaj maharaĝino de Raĝpipla, regiono en la hinda federacia ŝtato Guĝarat. Kiam li konfidis sin al loka gazeto antaŭ naŭ monatoj, Hindio havis skandalon, kaj la gazetaro de la lando temon, kiu de tiam estas regule diskutata kontroverse. Geja princo - ĉu tio rajtas esti? Ĉu la punado de samseksemo estas ankoraŭ laŭtempa?



**samseksamo en Hindio estas punebla**

La paragrafo 337 de la hinda kriminala kodo punas samseksemon. "Kiu libervole havas nenaturajn seksajn interilatojn kun viro, virino aŭ besto, estu punata per dumviva puno je malliberejo au per mallibereja puno ĝis dek jaroj kun monpuno", estas skribita en la teksto verkita de la tiamaj britaj koloniregantoj en la jaro 1861. La angloj estas preskaŭ 60 jarajn for, la leĝo ankoraŭ validas. Kvankam nur malofte okazas akuzo, gejoj tamen estas ofte elmetataj en Hindio al mistraktoj. Okazoj de ĉantago, eĉ de policanoj, ne estas maloftaj. En la kapoj de multaj homoj en Hindio samseksemo estas ankoraŭ rigardata kiel krima. Plendo kontraŭ ĉi tiu leĝo estas aktuale traktata ĉe la Supera Civila Kortumo en Nov-Delhio. Pluraj hindaj eminentuloj, inter ili la Nobel-premiito por ekonomio Amartya Sen kaj la verkisto Vikram Seth, pledis por abolicio de ĉi tiu paragrafo.

La 41-jara Gohil batalas komune kun hom-rajtuloj kontraŭ la diskriminacio de sam-seksemuloj. De kiam gazeto titolis en marto sur la unua paĝo: "La princo de Raĝpipla deklaras, ke li estas geja", lia vivo sanĝiĝis radikale. La publiko evitas lin, en Raĝpipla, urbo kun cirkaŭ 70.000 enlogantoj, forbruligis kolerigita homamaso bildojn de la princo. Li almenaŭ povas vivi nun honestan vivon, citas "Los Angeles Times" la viron. La tempo ja estas forpasita, dum kiu aŭro de privilegiulo ĉirkaŭis lin, en kiu ĉiuj homoj en lia hejmurbo admiris lin kaj en kiu la ĉiutago en vilaoj aŭ en la familia rezidenco en Bombajo estas faciligita de sennombraj servistoj.

### Senheredigo per gazetanonco

Nobeluloj en Hindio ja ne plu havas politikan potencon ekde la sendependiĝo de Hindio en la jaro 1947, apartenas tamen ofte ankoraŭ al la plej riĉaj de la lando - ankaŭ la familio de Gohil: La maharaĝo de Raĝpipla kaj sia edzino estas la plej grandaj terposedantoj en la regiono. En ilia kastelo Gohil pasigis sian infanecon. Al sia familio li evidentigis sin jam antaŭ kvar jaroj. Nun la gepatroj senheredigis sian solan filon publike. Pere de gazetanoncoj ili sciigis, ke li estas implikita en "aktivaĵoj nekacepteblaj por la socio" kaj ke ili tial ne rigardas lin kiel sian heredanton. La patrino minacas al ĉiu, kiu nomas Gohil ŝian filon, per juraj konsekvencoj.

Avide la bulvarda gazetaro ekkaptis la rakonton kaj ofertis Gohil la eblon rakonti el lia vivo. "Iam mi sentis, ke mi estas alia ol aliaj ", diris Gohil en sia intervjuo. "Kiam mi atingis la aĝon, kiam la intereso por la alia sekso evoluiĝas, mi rimarkis, ke mi ne sentis min altirata de virinoj, sed de viroj." Kiam Gohil havis 14 jarojn, samklasano atentigis lin pri lia alieco. "Li aliris min demandante: 'Ĉu vi estas gejo?' Mi diris: 'Kio? Mi ne scias.' Poste mi iris hejmen kaj rigardis en leksikonon por ekscii, kion tio signifas. En tiu tamen nenio estis skribita pri tio."

La knabo rapide rimarkis, kion gejeco signifas en Hindio: ke oni devas decidi sin por vivo en konstruaĵo el mensogoj aŭ por vivo kiel elpelito. Li decidis sin por la mensogoj kaj komencis rilaton al samaĝa knabo, kiu laboris kiel servisto de lia familio. La sekreta amafero daŭris, ĝis kiam ambaŭ havis 18 jarojn.

**Gepatroj elrigardis por fianĉino dum multaj jaroj**

Liaj gepatroj rimarkis nenion, ili edukis sian filon severe kaj elrigardis, kiel en Hindio kutime, por tauga edzino. En la aĝo de 25 jaroj Gohil edzinigis nobelulinon el la federacia stato Madja Pradeŝ.

Ĉiuj klopodoj de lia edzino sekse delogi lin, finiĝis per larmoj. Laŭ propraj indikoj Gohil ne plenumis la edzecon. Ŝi trenis lin al kuracisto, tiu tamen ne povis diagnozi iun malsanon. 15 monatojn post la geedziĝo ambaŭ malgeedziĝis.

Sed la vivmensogon Gohil ankoraŭ nun preferis al la socia fino: La princo daŭrigis vivi kiel antaŭe, liaj gepatroj ekserĉis novan fianĉinon por sia filo. Nur iom post iom la princo komencis ekkontakti la gejaron de Bombaj kaj engaĝi sin kiel kontraŭaidosa aktivulo. "Miaj gepatroj pensis, ke mi iras al la joglernejo, sed efektive mi disdonis kondomojn", diris Gohil. Sed kiam ajn li flugis el Bombaj al sia hejmurbo en Guĝarat, la homoj en Raĝpipla demandis lin, kiam li intencas denove edziĝi. La gepatroj ĉiam pli intense serĉis taŭgan edzinon, la premo al Gohil kreskis.

**Malkaŝigo post kolapso de la nervo-sistemo**

En la jaro 2002 li finfine suferis kolapson de la nervosistemo - li devis pasigi 2 semajnojn en malsanulejo. Gohil konfidis sin al sia kuracisto. La medicinisto aranĝis renkontiĝon kun liaj gepatroj kaj lia fratino, kie li sciigis la familion laŭ deziro de Gohil, ke Gohil estas samseksema. La familio ne volis kredi tion. La fremdiĝo komenciĝis, Gohil ĵetis sin en laboron kaj engaĝis sin eĉ pli intense en la helpo kontraŭ aidoso. Jam en la jaro 2000 li estis fondinta por tio la organizon Lakŝija Trust. La hetero-seksemaj amikoj de Gohil, diras li, reagis ŝokitaj, kiam ili eksciis pri lia seksa orientiĝo. Liaj samseksemaj amikoj estis ŝokitaj, kiam ili aŭdis, ke li iam havis edzinon.

Gohil tamen pentas nenion. La Unuiĝintaj Nacioj distingis lian organizon antaŭ ne-longe, la intereso de la internaciaj amas-komunikiloj pri li kaj lia laboro kreskas kaj ankaŭ en Hindio mem pli kaj pli homoj pledas por ŝanĝo en la pensmaniero rilate al samseksemo.

La patrino de Gohil kaj li nun kiel antaŭe ne parolas unu kun la alia. Sed lia patro koncedis antaŭ nelonge en intervjuo, ke li, rilate al la senheredigo, agis "sub la premo de amikoj kaj parenculoj". Verdire lia knabo ja estas "bona filo". Ambaŭ viroj okaze renkontiĝis denove en la plej lasta pasinteco.

(*trad. M. Wolf el la germana Spiegel-online)*

# T E M O J

## AIDOSO: Malfacila klerigo en Afriko

Klerigado pri plisekura amoro en la kontinento Afriko ne ĉiam estas plej facila laboro por Eŭropanoj, ĉar la diferencoj de la pensmanieroj ofte estas vere eminentaj. Mi aŭdis tri rakontojn, kiu tre vive tion ilustracias: – Se oni proponas al viro uzi kondomon, tiu eble respondas al vi, ke lia kaco estas tiom granda, ke ne estas trovebla iu konforma kondomo. – Al kuracisto, kiu malinjektis sangon el ties brako por medicine ekzameni ĝin, viro diris, ke la doktoro pli bone fortranĉu tiun brakon por forigi la malsanan membron, anstataŭ senefike trakti ĝin per pingloj. – Al viro oni eksplikis la uzon de kondomo tiel, ke oni demonstre ŝovis ĝin super la stango de balailo. Tiu viro nun antaŭ la amoro kun edzino ŝovis kondomon super la stango de la hejma balailo kaj starigis tiun ĉe la muron de la ĉambro kiel taŭga metodo petalvoki la fantomojn.

## AIDOSO: Breĉo en la defendo de HIV

Eble oni nun trovis malfortan lokon sur la aidoso-viruso, kiu iam ebligos vakcinan metodon kontraŭ la mortiga infekcio. Usonaj esploristoj per fotoj je atoma nivelo pruvis en la brita scienca magazeno "Nature", ke la pinto de pikilforma ekstremaĵo, kiun bezonas la viruso por ligi sin al korpaj ĉeloj, estas parto de la viruso, kiu ne ŝanĝiĝas, kontraŭe al la ĝenerala konduto de tiu tre mutaciema viruso, kiu krome posedas kovraĵon el glukozaj substancoj kiu malhelpas la antikorpetojn kroĉi sin al la viruso por malfunkciigi ĝin. Tiu same neŝanĝiĝanta kaj atingebla loko sur la viruso nomiĝas glikoproteino120 kaj estas la celo de antikorpeto nomata b12, kiu sentaŭgigas tiun lokon.

## KONDOMOJ: La ŝpruca revolucio

Nova inspira kvazaŭkosmetikaĵo larĝigas la jam riĉan gamon de amoriloj kaj en apartaj situacioj certe plialtigas la ĝuon de la interkorpa ludo. La nova kondomo aperas el aerosola ŝprucskatolo kaj perfekte adaptiĝas al ĉiuforma kaco. Post ties rigidiĝo la viro ŝovas sian plej karan parton en la ŝprucan ĉambron de la nova invento kaj laŭ premo de butono flueca latekso ŝprucas el multaj ajutetoj, sin distribuas samegale super la tuta organo, kaj tiel certigas plenan sekurecon por la koito. Post kelkaj sekundoj de vulkanizaj reakcioj la flueca tavolo sur la kaco solidiĝas kaj ebligas senperturban uzon de la kondomo. Post la agado oni simple povas deŝovi la kondomon laŭ la kutima maniero. Oni planas enkonduki la novan kondomon dum la somero 2008, kaj ĝi haveblos en pluraj ŝatataj koloroj. Ĝis tiam ankoraŭ estas farendaj pluraj testoserioj laŭ la severaj reguloj pri sekureco kaj homkorpa akordiĝeco.

## MALJUNULOJ: Loĝhejmoj por gejoj

En Hollywood, la fama urboparto de Los Angeles, oni malfermis hejmon por pli maljunaj gejoj, gejoj kun malaltaj enspezoj aŭ senhejmaj gejoj, konstruita de altruisma organizo "Gay & Lesbian Elder Housing". La projekto ampleksas 104 loĝejoj, el kiu triono estas rezervata por HIV-pozitivuloj resp. aidosomalsanuloj, kaj al ĝi apartenas ĝardeno kaj naĝbazeno. La hejmaro estas financiata per la ŝtato California kaj de la urbo kaj postulas ĉ. 21 milionojn dolarojn. Oni realigis ĝin inter alie pro tio, ke en kutimaj maljunulejoj ofte regas homofobio kaj krome ne vere ekzistas tia loko, kiu estas konforma kun la bezonoj de la gejaj viroj, al kiu krome ofte mankas familio kaj ties subteno.

## NUPTOJ: 1a gejnupto en Mexico-urbo

En Mexiko-urbo oni solenis la unuan oficiale registritan partneriĝon de du viroj, nome la 31-jara Jorge Cerpa kaj la 39-jara Antonio Medina. Kontraŭ la urĝa voto de la konservativa federacia registaro la parlamento de Mexiko-urbo decidis lastan novembron instali nun la institucion de la registrita partneriĝo, cetere kiel dua post la federcia ŝtato Coahuila, kie simila regularo validas jam de januaro. La leĝo donas al samseksaj paroj similaj rajtoj kiel al geedzoj en la kampo de heredo, pensio kaj pliaj socialaj aferoj.

## NUPTOJ: neniu gejnupto en Francio

En la jaro 2004 Stéphane Charpin kaj Bertrand Charpentier donis sin la vorton "Jes" en Francio en la sud-okcidenta komunumo Bègles. La tiama urbestro de la verda partio Noël Mamère nuptis ilin kun la pravigo, ke la por gejaj kaj lesbaj paroj malpermeso nupti estas kontraŭ la bazaj homrajtoj.Nun la plej alta juĝejo de Francio nuligis definitive tiun nupton, tiel sekvante la argumenton de la ŝtata prokuroro, ke estas la afero de la politiko decidi, ĉu geaj kaj gejaj paroj havu la samajn rajtojn. En la pravigo de la juĝo la juĝistoj citis: "Laŭ la franca leĝo la nupto estas kunligo inter viro kaj virino".

## NUPTOJ: manifestacio en Ĉinio

Je la tago Valentina la unuan fojon ĉinaj gejoj kaj lesboj demon-straciis por malfermi la edziĝon ankaŭ por gesamseksemuloj. Pluraj aktivistoj disdonis flugfoliojn en homplena komerca kvartalo de Pekino, kaj dum la 20 minutoj de tiu agado la polico ne intervenis. Manifestacioj ne antaŭregistrataj ne oftas en tiu komunista lando. En Ĉinio samseksamo ĝis hodiaŭ estas tabuo kaj la cina registaro fakte jam malpermesis plurajn gejajn hejmpaĝojn en la interreto.

## POLICO: Policistoj montru virecon

La proklamisto de la nacia polico de la Filipinoj, Samuel Pagdilao, konfirmis, ke ja ekzistas ordono al la viraj policistoj, subkomprenante certe la gejajn el ili, ne kondutu tro ineca, sub la minaco esti maldungita. "Se ili ŝvingetas la koksojn kaj montras voluptoakcentatan konduton dum sia servotempo, tio laŭ mia kompreno ja estas kaŭzo repripensi nian labor-kontrakton" li diris. Kaj ke li certe ne volas diskriminacii gejojn, tamen fakte ja ekzistas limoj.

## CSD: Jerusalemo kaj la fiera parado

La 21an de junio okazu CSD-parado en la ĉefa urbo de Israelo, tiun permeson oficiale peticiis la organizantoj de la CSD Jerusalemo. La proklamistino Ajelet Schnur invitis ĉiun, kiu subtenas la seksuman plurecon kaj substrekis, ke tiu parado estos la ĉefa evento por homaj rajtoj en Jerusalemo tiun ĉi jaron. Lastan jaron povis okazi nur neoficiala evento en stadiono kie kolektiĝis miloj da demonstrantoj.

## CSD Fiereca Parado en Tokio

En tiu ĉi jaro, en la 11a tago de aŭgusto, *(la lasta tago de la UEA-kongreso, la red.)* okazos Fiereca Parado en Tokio. En la parado, ne nur lesboj, gejoj, ambaŭseksamantoj, sed transgen-ruloj, transseksuloj, interseksuloj kaj aliaj diversaj seksamantoj marŝos en la kvartalo Shibuya kaj Harajuku. Mi scias ke en la tago okazos UK en Jokohamo. Bedaŭrinde mi ne povas iri al la parado nek UK. Sed vi ol lsg-ano, se vi interesiĝas, bv. partoprenu en la parado. La oficiala paĝo de la Fiereca Parado estas jene:

http://parade.tokyo-pride.org/6th/

Bedaŭrinde, nun la paĝo estas skribita nur en la japana, sed eble la organizanto la anglan paĝon preparos. *(de japana samligano)*